



# monda solidareco

N-ro 112 - Marto 2015 - kvaronjara - 1.25 €

## Klimataj ŝanĝoj : ni estas koncernataj

Tero, nia planedo, nia komuna hejmo malbone fartas. Sonoras kiel gurda rekantaĵo rediri tion : sekecoj, varmegoj, ŝtormoj, inundoj, erozio ... jam delonge oni konis tiujn fenomenojn, sed nun sense percepteblajn jaron post jaro, ĉiu vidas la ŝanĝojn : pli kaj pli oftaj, pli kaj pli gravaj.

### La kialoj estas konataj ...

La unuaj alarmoj sonis antaŭ pli ol 40 jaroj. Unue la alarmo temis pri la poluadoj precipe el kemia aŭ atoma devenoj. Kelkaj gamoj da produktoj kaj kelkaj praktikoj estis forigitaj. Depost 1992, unua ĉefkonferenco en Rio, oni estas multe pli atentemaj pri evoluado de la klimato : ni konstatas plialtiĝon de la meza temperaturo de la malaltaj tavoloj de la planeda atmosfero. Ĉefe kulpas la konsumado de la fosiliaj energioj : nur en kelkaj jardekoj la homaro bruligis, do ellasis en atmosferon sub formoj de karbonaj substancoj kion la naturo stokis dum milionoj da jaroj : karbo, nafto, gaso. La forceja efiko de tiuj ellasitaj gasoj estas pruvita, aldone al aliaj eblaj kialoj de la klimata plivarmiĝo. Nu la homaro kreskas kaj ankaŭ ties energiaj bezonoj.

### ... ankaŭ la solvoj!

Nia 21a jarcento situas en kruca punkto. Se ni mankas tiun rendezuon kun historio, le estontaj generacioj ne havos estontecon. Maro inundos la malaltajn landerojn, dezertoj plivastiĝos, brutaro ne trovos nutraĵon dum vintrecaj sezonoj, uraganoj kaj ciklonoj fariĝos pli multaj kaj pli fortaj, pluvegoj katastrofaj, al homoj nutraĵo mankos, la urba aero fariĝos nespirebla, alergioj kaj malsanoj plimultiĝos. Ĉiuj ni estas koncernataj.



Tial oni komprenas la maltrankvilecon de la 300 000 manifestaciintoj, kiuj « marĉis por la klimato » en Novjorko le 21an de septembro 2014 ; tiun de 20 000 partoprenantoj en la monda forumo de Lima (Peruo) pri la klimato dum la « partioj » (la ŝtatoj) konferencumis « COP-20 ». Grupoj da scienculoj proponis celon : malpliigi de 15 % la kvanton de karbona dioksido en atmosfero, kaj por atingi tion, centoj da decidoj estas proponitaj al la registaroj. Nu tiuj lastaj estas multe pli atentemaj pri la ekonomiaj interesoj kiujn ili devas defendi kaj pri la efiko de siaj decidoj super la voĉdonantaron, ol pri la bonfarto de ĉiuj popoloj tra la mondo. Komprenoble, necesas premumi super la registaroj por ke, en Parizo en decembro 2015 dum « COP-21 », trafaj decidoj estu adoptitaj kaj plenumitaj, sed ĉu ni, civitanoj, devas atendi ilin ?

## Enhavo

Klimataj ŝanĝoj .....	p. 1
Pri Ebola .....	p. 2
Vojoj de la Solidareco .....	p. 3
Arta ekspozicio .....	p. 4
Anekdotoj de F Bayo .....	p. 5
Rizkultivaj novigoj .....	p. 6 kaj 7
Miam'iam .....	p. 8
Kolofono .....	p. 8

Je sia nivelo, Monda Solidareco kontraŭ la Malsato povas agadi esence per la elekto de la projektoj. Kelkaj praktikoj estu forlasitaj, dum aliaj estas plibonigeblaj. Ankaŭ oni ne timu novenkonduki. Sed ne ekzistas ebla katalogo da bonaj aŭ malbonaj praktikoj aŭ da respondotaj defioj. Fakte ĉiu projekto enŝoviĝas en aparta medio kaj estas kapabla influi sur la lokajn ekosistemojn. La projekto-portantoj mem fariĝu atentemaj pri la ekologia efiko de ĉiu projekto, sed ankaŭ nia tuta ĉeno de decidpovo kaj de solidareco atentu tiujn aferojn, kiuj koncernas nian estontecon kaj nian kunvivadon.

Daniel Durand

*Esperanto estas la oficiala lingvo de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato*

# Pri Ebola

## Sano estas tutmonda problemo

De pluraj monatoj oni parolas, en okcidento, pri epidemio de ebola viruso kun pli malpli da angoro laŭ ke kelkaj el samlandanoj estas tuŝitaj aŭ ne de la malsano. Guillaume Duval mencias tion en sia eldonartikolo de « Alternatives Économiques » de novembro 2014 : kiam la epidemio stagnis en Siera Leono, en Liberio aŭ en Gvineo, pria emocio estigita en Okcidento restis negranda (...) sed pro la unuaj kazoj aperintaj en Hispanio aŭ en Usono, ektumulto ĝeneraliĝis ». Tio estas forgesi la relative freŝdatajn epidemiojn, kiel tiu de kolerao en Provenco en 1830, tiu de pesto en Alĝerio en 1945 ; tio estas forgesi, ke tiujn gravajn epidemiojn forigis sanitaraj kaj socialaj decidoj ; tio estas forgesi, ke oni ne povas vivi flankenlasante parton de la homaro.

La riĉaj landoj, kiuj havas sansistemon protektantan siajn riĉulojn, malpli prizorgas la vivkondiĉojn (alirebleco al nutrado, al edukado, al flegado) ol la ekspluateblajn riĉofontojn de la malriĉaj landoj. Tiel vakcinado, preventa aranĝado, flegado certe ne profitis de la necesaj buĝetoj por trakti la malsanon antaŭ ol ĝi fariĝis epidemia en sudsahara Afriko.

Depost la ekapero de la ebola viruso en 1976, oni nombras dek-kvinon da epidemioj kun relative malmulte da viktimoj (315 dum la plej grava). Laŭ Eric Leroy, direktoro de CIRMF (Gabono) la nuna epidemio daŭros ankoraŭ dum ses monatoj ĝis unu jaro kun 10 000 ĝis 20 000 novaj kazoj. Kaj ju pli la viruso replikiĝas, des pli granda estas la probableco de mutacio, des pli la malsano estos modifita kun malsamaj klinikaj signoj, kaj do des pli malfacilos recepti flegan traktadon. La bilanco de MOS (Monda Organizaĵo pri Sano) fine de decembro 2014 estas 7373 viktimoj. Laŭŝajne la anoncita eksponenciala kresko de la epidemio estus ĉesinta, sed la malsano plu ekzistas, ŝanĝiĝas kaj disiĝas.

### Kiel oni atingis tion ?

En situacio de eknomia miselvolviĝo, foje de enlanda milito, tiam epidemioj disvastiĝas tiamaniere.

« La ebola krizo estas signo de miselvolviĝo kaj evidentigas priplorindajn sistemojn de distribuado de la sanzorgoj en plej multaj afrikaj landoj, kiuj ofte eliĝas el milito aŭ armitaj konfliktoj » ; (Tutafrika reto pri neperforto kaj plifortigo de paco)

Polemiko ekestis inter IMF (Internacia Mona Fonduso) kaj Britaj serĉistoj, ĉar tiuj lastaj akuzis la unuan kiel kulpantan pri la disvastigo de la malsano pro la truditaj buĝetaj limigoj : tiuj limigoj tenas la koncernatajn landojn en plua malriĉeco kaj en nekapableco evoluigi adaptitan sanitaran sistemon. La konsekvencoj de la epidemio estas diversaj kaj gravaj.

La sansistemoj de la tuŝitaj okcidentafrikaj landoj, jam misfunkciantaj, estas minacataj de kongesto de la servoj. Kvankam neniel rilatas Ebolo kun malario, tiu lasta, kiu regresis de 47 % en la mondo kaj de 54 % en Afriko, laŭ MOS, povus vidi ĝian traktadon ege afliktita. Estas same por aliaj malsanoj.

« Tiu viruso ne nur mortigas la loĝantojn, sed ĝi disvastigas timon kaj malstabiligas la okcidentafrikajn komunumojn. » Se nenio estas farita, timindas intensiĝo de perfortoj kaj konfliktoj por aliro al flegoj, nutraĵoj, kaj semoj.

Fine kelkaj maltrankviliĝas pro tio, ke « tiu medicina kaj homa krizo povus esti ekspluatita al politikaj kaj ekonomiaj celoj de iu ajn lando aŭ partio ».

Eble ankoraŭ estas tempo reagi, apogi tiujn kiuj petas la nuligon de la ŝuldo de la landoj en malfacilaĵoj, postuli respekton de la homaj rajtoj kiel la aliro al nutraĵo al edukado kaj al flegado.

Eble ankoraŭ estas tempo ekkonscii, ke la sanproblemoj estas tutmondaj problemoj, ke ili estas ankaŭ ekonomiaj problemoj, socialaj problemoj, kaj ke kiam ĉiu havigos al si decajn vivkondiĉojn, malsanoj povos ekaperi sed ne atingos la gravecon de la ebola epidemio.

Eble ankoraŭ estas tempo ekkonscii, ke kio tuŝas parton, eĉ etan, de la homaro, tio tuŝas la tutan homaron, kaj ke ni estas la loĝantoj de unu unika planeda vilaĝo ».

*Danièle Charier  
2an de januaro 2015*

### **Fontoj de tiu artikolo :**

Guillaume Duval en « Alternatives Économiques » n° 340 novembre 2014

Eric Leroy direktoro de « Centre International de Recherches Médicales de Franceville » (Gabono)

Pan African Nonviolence and Peacebuilding Network en "Union Pacifiste de France" novembre 2014

TV5 Monde Afrique (22.12.2014)

# La vojoj de la solidareco

La grupoj Ayidjedo « Ajiĝedo » en Benino kaj Novilonlon en Togolando ĵus ricevis la unuan parton de sia financado.

Du aliaj grupoj estos financitaj en marto : Djifa kaj Amenouveve en Togolando.



Bonvenon al la nova sekretario de la PKB de Benino, **S-ro Djossou Irénée**, kiu ĵus oficiĝis anstataŭ **Constant Gbezé**.

Ni gratulas lin kaj ni deziras bonan kuraĝon por bone plenumi sian mision.

**La Federacia Administra Konsilantaro (AK) kunvenis la 6an kaj 7an de decembro 2014 en Nouaillé-Maupertuis (86)**

## Funkciado

↪ Diskuto okazis pri la nova financmaniero de la projektoj nur per senintereza pruntodono. Kvankam tiu maniero estis adoptita dum la Ĝenerala Asembleo en Vagaduguo en novembro 2013, eble estas ankoraŭ tempo eventuale rekonsideri tiun decidon, ĉar ĝi ankoraŭ ne ricevis plenumon. Konsultado de la korespondantoj kaj membroj de la Kunordigaj kaj Pluzorgaj Burooj (KPB) estis lanĉita.

↪ La problemaj aferoj en Burkinio (afero Dramane Traoré) kaj en Togolando (afero Yaovi Kuadjo kaj la situacio en Sokodeo) ne progresas. La administrantoj relanĉos la agadojn.

## La projektoj

↪ La Pluzorga kaj Kunordiga Buroo (PKB) de Benino prezentis sian novan sekretariojn : S-ro Irénée Djossou, kaj sendis agadan raporton. La vizitoj de la projektoj rekomencis kaj novaj grupoj aliĝis al MSM. La grupo Sodjinemawu sendis raporton pri la evoluo de sia projekto de fiŝkapt ekipado.

↪ La grupo FOMARC en Boma en Kongio sendis raporton pri la progreso de la projekto de legomkultivado kaj de porkobredado.

↪ Edwige Géniteau restadis tri monatojn en Burkinio, kie ŝi estis en rilatoj kun la burkinaj globidaranoj.

↪ La PKB de suda Togolando (« Globidar-Togolando ») sendis agadan raporton. La grupoj en departemento « Bas-Mono » : Novilonlon kaj Djifa baldaŭ ricevos la financadon de siaj projektoj.

## Animado

↪ Diversaj renkontoj pro civitanaj iniciatoj aŭ en la kadro de la Semajno de Internacia Solidareco okazigis prezentadon de MSM.

↪ Arta ekspozicio profite al MSM okazis en Poitiers (86, Francio)

# Arta ekspozicio profite al MSM

Por replenigi la kason de MSM, Claudine, Edwige kaj mi elpensis iniciati ekspozicion de artistaj ĉefverkoj, kiuj konsentus pagi procenton de siaj vendoj al MSM.

Nadine Dieulefit, akvarelistino en Poitiers, Fodé Bayo skulptisto el ligno kaj metalo, jam en rilato kun MSM kaj Abdoulaye Gandema, majstro-bronzaĵisto volonte konsentis partopreni en tiu manifestacio. Nadine Dieulefit, kiu instruas akvarelarton, petis siajn gelernantojn. Multaj donacis laboraĵojn, dankege al ili.



De maldekstre dekstren : Claudine Tournier, Fodé Bayo, Nadine Dieulefit kaj Danièle Charier



Bronzaĵoj kaj lignaj skulptaĵoj antaŭ la akvareloj

Fodé Bayo posedas atelieron en Vouvray (37, Francio), alian en Vagaduguo (Burkinio) kaj fondas Interkulturan Centron en Bobodiulaso (Burkinio). Abdoulaye Gandema havas atelieron en Brux (86, Francio) kaj alian en Vagaduguo. Dum la ekspozicio, li restadis en Burkinio ; li konfidis siajn verkojn al geamikoj en Brux.

La ekspozicio okazis de la 18a ĝis la 26a de oktobro en la senpage disponigitaj lokaloj de la departementa Ligo de Instruado de la Departemento Vienne » en Poitiers). La regiona Centro de pedagogia dokumentado (CRDP) pruntedonis vitrajn ŝrankojn por valorigi la malgrandajn skulptaĵojn kaj la Civitanoj de la Mondo en Puatuo-Ĉarentoj pagis kelkajn elspezojn kiel afiŝojn, poŝtmarkojn ... Ni dankas al tiuj asocioj pro ilia subteno sen kiu la okazigo de la ekspozicio estus malfacila.

Dank'al Michel, Baptiste, Pierre, Fodé, Bertrand kaj Antoine, kiuj transportis, muntis kaj malmuntis la tre pezajn vitroŝrankojn de CRDP, dank'al ankaŭ Line, Pierre, Denyse, Jeanne kaj Arlette, kiuj deĵoris kun Claudine, Edwige kaj mi, ĉio estis perfekta ! Jes, perfekta !

Malgraŭ la malproksimeco de la urbocentro kaj malgraŭ la feria periodo, ni ricevis multajn vizitantojn, kiuj malkovris la teknikon de « perdita vakso » por la kreado de bronzaĵoj, aŭskultis la poetajn komentojn de Fodé pri liaj verkoj, aŭ admiris la pentraĵojn de floroj aŭ pejzaĝoj de Oleronaj marĉoj far Nadine Dieulefit.

Tiu manifestacio profitis per 681 € al MSM. Tio estas malmulta rilate al la bezonoj, sed jam.

Danièle Charier



## *Anekdoto dum la arta ekspozicio de MSM*



Karaj legantoj de la bulteno de MSM, mi informas vin tie ĉi pri malgranda anekdoto ĉirkaŭ la ekspozicio, kiuj okazis de la 18a ĝis la 26a de oktobro 2014 en Poitiers.

Respondante al alvoko de Danièle Charier, adjunkta federacia sekretariino de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato, mi Fodé BAYO partoprenis en la ekspozicio kun du aliaj profesiaj artistoj Nadine Dieulefit kaj Abdoulaye Gandema, por alporti nian eron de solidareco kontraŭ la malsato.

Sed, jes ne atendita « sed-o », Danièle neniam diris al mi, ke ŝi havas kelkajn eksperimentojn en riparado de veturiloj.

Oni diru al si la veron, amikoj legantoj, tio estis finsemajno plena je emocioj kaj ridoj estigitaj de mia veturilo. Dum mi loĝas je 140 km de la ekspoziciejo mi eksentis iun ridecan etoson ekde la 45a km de mia hejmo, ĉar de tiu distanco mi havis la malbonan ideon ekhalti por informi Danièle pri mia alveno. Post tiu mallonga telefonalkvoko, mia veturilo ekkoleris, ĉar mi ne antaŭsciigis al ĝi prie antaŭ ol elŝalti la motoron.

Tial, neebleco restarti. Necesis la interveno de kunlaboranto por insiste peti mian veturilon kun interbateriaj kabloj, bonvoli restarti.

Fine jen mi alvenas ĉe Danièle. Kaj necesas ekiri al la ekspozicia galerio, mia veturilo rekomencas siajn kapricojn kaj paŭtas ; tiam mi petas Danièle interveni per bateriaj kabloj, ĉar pasas la tempo kaj ni mem malfermu la ekspozician galerion.

Kompreneble ŝi estas preta interveni, krom tio, ke ŝi stiras de nur ĉirkaŭ 50 jaroj kaj ankoraŭ ne scias kiamaniere malfermi la motorkapoton de veturilo (*rido !!!*). Fine mi sukcesis malfermi la kapoton kaj provizi mian veturilon por restarti.

Tio okazis dum mateno, sed jen la vespero, ni reiru ĉe Danièle kaj mi ne devas ŝalti la reflektorojn, ĉar la baterio estas malplena, kaj tamen nokto nigras.

Nu, mi ne rakontas al vi la multajn sinsekvajn haltojn, ekirojn kaj restatojn kun la helpo de Danièle, kiu daŭre ne sukcesis mem malfermi sian veturilan kapoton. Mi informas vin, ke ni trafikis sur departementa vojo dense uzata, ke ne ekzistas vojbordero, kaj ni veturu ĉirkaŭ 30 km. Sur tiu vojo, ni haltis kvarfoje pro la ĉefa kialo, kiun mi ne konis, ke mia alternatoro estis foruzita kaj do la baterio malŝarĝiĝis ĉiufoje kiam mi ŝaltis la reflektorojn.

Ĉio por diri, ke tio estis bela homa kaj solidareca aventuro laŭlonge de tiu ekspozicio profite al MSM.



*Fodé Bayo, skulptisto*

<http://www.fode-bayo.com> <http://cibobo.over-blog.com>

# « Ĉu la tero ne plu nutras sian homon ? »

## Rizkultivaj novigoj en la interna delto de la riverigo Niĝero (Malio)

La nereguleco de la pluvoj laŭ la tempo vundebligis la kultivistojn pro la malvastiĝo de la inundeblaj areoj. La inondeblaj (do fekundigitaj) areoj en la interna delto de Niĝero malvastiĝis de 30 000 km<sup>2</sup> en 1950 ĝis 10 000 km<sup>2</sup> en 1984. La pluvmanko estas de 19 %.

Tiu laŭnature agropaŝtista areo estas submetita al multaj nesekurecoj kun malvastiĝo de spacoj kultureblaj en areo kun malnova rizkultiva tradicio. Fakte, de la interna delto disvolviĝis la kultivado de la afrikaj flosantaj rizoj, kun indiĝena sovaĝa rizvario ... La kultivataj varioj estas indiĝenaj rizoj ligitaj al la vario *Oryza Glaberrima*.



Foto 1 : eŭkaliptidoj en la vilaĝo Kotaka



Foto 2 : Irigacia pumpatoro

Kiamaniere la agrokulturistoj sukcesas plu gardi, eĉ plibonigi sian ĉefan produktomanieron en tiu medio de klimata kaj socia-politika nesekureco ankoraŭ pli grava de post aprilo 2012 pro la operacioj de Al Qaïda en Islama Magrebo (AQMI) norde de Malio ? Fronte al la manko de irigacia tradicio, la regado de akvo en la vilaĝaj irigaciitaj parcelaroj (VIP) aranĝitaj komence de la 1990aj jaroj estas nova celo kaj tiu novigo de praktikoj partoprenas en novigaro, kiu karakterizas la vilaĝajn dinamismojn.

Fakte rizo fariĝas estiganto de dungoj kaj de plivaloroj.

La novaj kultivovarioj de rizo : « NERICA » (=New Rice for Africa) evoluigitaj per bioteknologio disvastiĝas nun al pli ol 3000 familioj. Temas pri la kunmetado de la rezistpovo de *Oryza Glaberrima* (el afrika deveno) kun la produktiveco de *Oryza sativa* (el azia deveno).

La proteina enteno estas 2 % pli alta. La rendimento estas ĉirkaŭ 4,5 tunoj hektare rilate al la indiĝena ruĝa rizo *Oryza Glaberrima* (0,5 ĝis 1 t/ha). Ja sukcesas tiuj novaj rizovarioj de tiuj VIP kaj tiuj produktoj estas tre ŝatataj de la urbanoj kaj de la loka enloĝantaro.



Oryza sativa – el Wikipedia

La disvolvado de la Vilaĝaj irigaciaj parcelaroj (VIP) , kiuj asociigas rizon kaj arbarigon el eŭkaliptoj estigis verdantajn pejzaĝojn, kiuj ekzistas nenie aliloke ol en tiuj vilaĝoj kiuj posedas tiujn VIP (foto 1). Tiu disvolviĝo de la irigaciita rizkultivado estis ebla ne nur pro la disvastigo de evolumodelo kun iu teknika aranĝomodelo, sed ankaŭ tra noviga kapablo de la agrokulturistoj, kiuj sciis plibonigi siajn farsciojn kaj fondi socian modelon de regado de tiuj VIP per kooperativaj reg-societoj.

La rizkultiva novigo de VIP naskas teritorian rekonsistigon. Ni ĉeestas la kreadon de novaj spacoj de dialogo kaj la renovigon de la povo-retoj, kiuj plifortiĝas, kiel la Kooperativaj Reg-Societoj, kiuj partoprenas en logiko de loka evoluigo malfavore al la kutimaj ĉefoj, kiuj estas pli malpli eksigitaj en la regado de parto de sia vilaĝa teritorio.

La rizkultivado en la interna delto de Niĝero, vasta inundebla regiono meze de Malia Sahelo, alportas novan gajnon de produktiveco. La freŝdataj irigaciaj teknikoj de la parceloj per pumpatoroj ebligas plibonigi la produktivecon de la grundo nun kun du jaraj rikoltoj el kiuj unu dum seka sezono ! Antaŭe la fekundigo de la grundoj rezultis de la ununura riveraltiĝo de Niĝero, kiu alportis pendantajn partiklojn. Nun la VIP estas fekundigitaj per kutimaj grasumoj.

Per la organizado de la kamparanoj en la Kooperativaj Reg-Societoj kaj la dungado de laboristaro alia ol familia en la laboroj, dungitaj inoj prizorgas la faradon de rizbedoj kaj la transplantadon (foto 3), kiu ne plu estas displantita sed laŭ tre strukturita maniero. Antaŭ aprilo 2012 tiu rizkultiva produktado necesigis komercan importadon.

Tamen, eĉ se la parceligo de la VIP kaj la socia organizado de la rizkultiva produktado en la vilaĝoj estigas kamparan evoluigon vole daŭreblan, pluraj demandoj povas esti faritaj :

- ↳ La socia-politika nesekureco en Malio antaŭ aprilo 2012 sendube tuŝas la disvolvadon de la irigaciitaj parcelaroj, kun jam observitaj malfacilaĵoj por la provizado de gazolo por la pumpatoroj (el ĉina deveno).
- ↳ Kiu estonteco por la tera proprieto pro la prapatra ĉeesto de pluraj proprietoj sur sama teritorio : agrokulturistoj, rizkultivistoj, migrantaj bredistoj laŭ la jaraj periodoj, kiam oni scias, ke konsekvence la teritorio de la Pulaj bredistoj malvastiĝas pro la konstanta ĉeesto de la VIP sur ilia prapatra teritorio ?
- ↳ Kiel plu gardi la indiĝenajn rizajn kultivovariojn, eĉ se ili malpli produktas por plu gardi tiun biodiversecon kaj la kulturen identecon de la enloĝantaroj ?

**Kadidia N. Bouaré Trianneau**, Doktoro pri geografio, Universitato de Poitiers.



Photo 3 : rizbedoj kaj plantado de rizidoj far la virinoj.



## Miam'iam (manĝi) ĉe hejmulo

Tiu asocio celas interligi homojn per la kunmanĝado ĉe hejmulo aŭ en kunveno laŭ diversaj elektoj, kiuj asociigas, laŭ kazo, senpagecon kaj partoprenon. En ĝi estas akceptantoj, akceptatoj kaj partoprenantoj. Ĉiuj estas « mi'am-uloj ». Krom la manĝado, la asocio proponas klopodon de frateco kaj civitaneco rekte inspiritaj de la ĉarto de la Mondcivitana Asembleo.

La renkonto kun Nathalie Dorville, la fondintino, kaj la kolektitaj atestoj kondukis nian Federacian Administran Konsilantaron alporti moralan subtenon al tiu eksperimento, kiu elvolviĝas en pariza regiono. Certe ni havos okazon prezenti la aktivecojn de « miamuloj » en aliaj bultenoj « Monda Solidareco ».

Dum renkonto pri komunikado en Ungersheim (apud Mulhuzo, Francio) en novembro 2014, Nathalie donis ateston tre fortan kaj emociigan pri komuna ekserĉo de digno de ĉiu homo, kaj precipe de ĉiuj, kiuj suferas pro nesufiĉa nutrado, en Francio same kiel aliloke.

La asocio « Miam'iam ĉe hejmulo » okazigos sian estontan ĝeneralan asembleon dum la venonta ekvinokso (20an de marto) tiel simbole aliĝanta al ĉiuj, kiuj tiam festas la jam akiratan mondan unuecon.



Nathalie dum la festivalo de la konkretaj utopioj

Contact : miamiam888@gmail.com  
<http://www.recim.org/ascop/miam.htm>  
<https://www.facebook.com/miamiamchezlhabitant>

## monda solidareco

estas bulteno eldonata de **Monda Solidareco kontraŭ la Malsato**

### JE VIA DISPONO :

- Aliĝiloj
  - Flugfolioj pri projektoj
  - Pliajn bultenojn
  - Federacia Reglmento de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato
  - Afiŝetoj (A3-formato)
- Bonvenas partopreno en la sendokosto (3 € aŭ pli)*

### Nur por Eŭropo :

- Blankaj ĉemizetoj : 20 € - trikoĉemizoj 15 € kun la emblemato « *Fonds Mondial* ».
- Kovertoj DL (11 cm x 22 cm) « *Solidarité Mondiale contre la Faim* » + emblemato : 6 € por 100 + sendokosto : 3 €
- Fotoj paperaj aŭ elektronikaj.

*Se vi konstatas malfruigon en la liverado (aŭ forgeson !) vi bonvolu fari al ni amikan realvokon ! Antaŭdanke.*

### KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ : Kiel pagi ?

- ↳ per franca ĉeko al **Globidar**
- ↳ per poŝtaj rimedoj, je la nomo de :  
**SMF- MONDA SOLIDARECO**  
(PĈK-CCP PARIS 10.734.96 Z)  
RIP:  
**FR21 2004 1000 0110 7349 6202 056**
- ↳ per banka karto aŭ **PayPal** tra la retejo **www.globidar.org**
- ↳ ankaŭ per monbiletoj enŝovitaj en ordinaran koverton.
- ↳ UEA kontoj : **mfsk-g**

*Librotenado je la sama adreso kiel la bulteno*

Sur la adresetikedo de la koverto aperas la proksimuma dato de via lasta financa partopreno. Vi bonvolu kontroli ĝin !

### RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ

Oktoebro 2014	2140 €
Novembro	860 €
decembro	3251 €
Januaro 2015	1004 €
februaro	459 €

**MONDA SOLIDARECO** estas eldonita en Esperanto, kaj franca lingvo.

**Jara abono : 5 €**

**Redakcia komitato :** John De La Cruz Danièle Charier, Daniel et Odile Durand, Claudine Tournier, Edwige Genireau

**Fotoj** el la fototeko de MSM  
**Emblemo :** Yamsina Saharaoui  
 Elfrancisgis Daniel Durand,  
 Kontrolis (ne)

Directeur de la publication : Daniel Durand  
 Imprimerie de l'association.

Tel : +33 (0)241 78 47 75  
[info@globidar.org](mailto:info@globidar.org)

### **MONDA SOLIDARECO**

Les Nids

**FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE**

Francio